

Ludwig Heinrich Christoph Hölty,  
Amkanto

*tradukita de Lorenz Urbano*

Pliraviĝas birdokant',  
se l' idol' anĝela,  
kiu igis min amant',  
migras en park' bela.

Pli kolore ĉiu flor'  
de l' herbej' aspektas,  
kie mia kortrezor'  
la bukedon plektas.

.....  
.....  
.....  
.....

Sen ŝi mankas vera ĝu',  
velkas plant' ĝardena,  
kaj vespere rug' ne plu  
igas min serena.

Mia kara sorĉistin'  
ĉiam ĉe mi restu,  
por ke ĝoj' plenigu min,  
feliĉul' mi estu!

*Traduko de la Germana poemo "Minnelied" de LUDWIG HEINRICH CHRISTOPH HÖLTY (Holtjo, Ludoviko Henriko Kristofo, \*1748-12-21 - †1776-09.01) en Esperanton de LORENZ URBANO (civila nomo: Heinrich Lorenz, \*1902 - †1980).*

*Arg-509-1000 (2010-02-02 10:03:02)*

*Tiun ĉi tradukon trovis s-ano Lars Kromann (Stenbrydervej 6, Værløse, DK-4640 Fakse, Danujo) en malnova numero de la revuo "Heroldo". Muzikaĵon por tiu ĉi poemo verkis la germana komponisto Johannes Brahms (17.05.1833 - 03.04.1897).*